

# EKO 2023



Nia aganto pri  
instruado kaj  
progreso

**Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro**

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikaĵoj**



**EKO 2023 / 34. Junio 13, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Pezo: Word: Nur teksto: 35 KB. Ĝia sveltigita PDF: 310 KB, Sume: 345 KB.**

Temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkröcis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.

## AMO 100 post sep tagoj

**Vi ĉiuj ricevis per EKO 32 la plenan temaron por la jubilea AMO-seminario**

Jen la ligilo, realigita pere de ILEI – la vere utila movada instanco.

Temo AMO 100: Esperanto aganta en la 21-a jarcento

Tempo: Junio 20, 2023: 07:30-10:30 Universal Time UTC (ekde 09.30 CEST)

Zoom-ligilo: <https://us02web.zoom.us/j/81269787236>

Nur se demandite: Kunven-identigilo: 812 6978 7236

Pasvorto: La nomo de nia komuna lingvo per minuskloj

Via aktiva partopreno estas forte dezirata!

## ILEI planas sian futuron

La Estraro de ILEI kunsidis por plani la estonton – la baldaŭan kaj la perpektivon. Ene de la Kongreso de ILEI, du eroj ricevis horojn; La kunsido de la Komitato de ILEI okazos en la lundo, la 7-an de aŭgusto de 14.30 ĝis 17.30 CEST (UTC ekde 16.30). Por ĝisdatigita listo de la ILEI-komitatoj, bonvolu vidi la koncernan paĝon en la retejo ([www.ilei.info](http://www.ilei.info). > instancoj > komitato). En la kongreso okazos AMO 102, kun la temo 'Interkulturo en lernejoj'. en vendredo la 11-a de aŭgusto, de 14.30 ĝis 17.30 CEST UTC ekde 16.30).

## Aruŝa bezonas apogon: UEA agas

UEA preparas sian unuan Universalan Kongreson en Afriko (Tanzanio 2024), kaj la juna Afrika Komisiono de UEA laboras por disvastigi kaj instrui Esperanton en ĉiuj afrikaj landoj. Tiucele ili bezonas retan radion, kaj amasfinancado per la retejo Ulule: <https://www.ulule.com/radio-esperanto-afrique/> ĵus komenciĝis por kolekti la monon necesan por aĉeto de la materialo. La prezento de la projekto nun estas dulingva (franca kaj Esperanto).



Dankon se vi povos kontribui en tiu financado (per klakado al la ĉi-supra ligilo) kaj diskonigi ĝin ĉirkaŭ vi (per plusendo de la sama ligilo). Ni esperas, ke la diversaj agadoj, kiujn ni jam nun klopodas en Afriko, ebligos, ke tiu rapide progresanta kontinento okupu la lokon, kiun ĝi meritas en la Esperanto-movado, kaj ke vi multaj partoprenos en la Universala Kongreso de 2024 en Aruŝo en Tanzanio.


François LO JACOMO, estrarano de UEA pri Informadokaj Eksteraj Rilatoj. Tel: 06 80 88 53 27

## Nova Eo-klubo en la nord-oriento de Kongo DR

Stariĝis nova klubo, Nyongera Esperanto- Klubo (NEK), kreita de s-ro Bienfait Machumu (krom-nomo: Bin Reĝo). Tiu estas mia lerninto kaj membro de mia klubo Rondo Esperantista de Kiwanja (REK). NEK havas kvin regulajn gekomencantojn kaj aliaj nur promesas veni al la kurso.

Malgraŭ la daŭrantaj efikoj de la milito, ni aŭdacas varbi novajn adeptojn kvankam ne publike, ni ja devas esti tro singardaj). Nyongera estas kvartalo en urbeto en la oriento de Kongo DR. Vidu kie situas la norda Kivuo sur la apuda mapo. Memoru, ke Kongo DR estas ege granda afrika lando.

Joel Muhire, UEA jmhr-a



## Novaĵoj de la Amerika Komisiono (AK)

En **Argentino**, la kunordiganto de la AK vizitis la oficejon de la Bona Aero Esperantista Societo en majo (vidu la foton, ene estas la kunordiganto de AK). Pli of 25 samideanoj interŝanĝis pri la estonteco de Esperanto en la urbo kaj lando. Oni multe parolis pri la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE), okazonta en Fortaleza, Brazilo de la 2-a ĝis la 5-a de novembro 2023. Oni parolis pri UEA kaj ĝia kapablo allogi kaj arigi novbakitajn lernantojn de la lingvo.

La **Ĉilia** Esperanto Asocio (ĈEspA) elektis novan estraron : José Antonio Vergara, prezidanto, Ronald Keith Sekretario, Ivan Mattig, Kasisto kaj estraranoj Dušan Juretić kaj Felipe Sanchez. La kunordiganto de la AK renkontis la prezidanton kaj parolis pri iniciatoj. Ekzemple, ĈEspA anticipas organizi kune kun la Argentina Esperanto-Ligo komunan kongreson en 2024. La foto sekvapaĝe estas pri Ĉilio



La AK organizis Zoom kunvenon kun **Ekvadoraj** samideanoj. La partoprenantoj indikis deziron renkonti unu la alian postpandemie. La AK organizis babilkunvenojn kun **Venezuelaj** samideanoj. Pli kaj pli

nun partoprenas kaj volas renkonti unu la alian en Caracas. La vivo ne estas facila en tiu lando tamen estas granda deziro de la esperantistoj aktivigi la movadon enlande.

Esperantistoj el Kebekio kaj Ontario provincoj de **Kanado** organizis la jaran Mez-Kanadan Esperantistan Kunvenon (MEKARO) en Midland, Ontario. Trideko da partoprenantoj vizitis la regionon kaj krozadis sur lago Huron.

La **Amerika Komisiono** renoviĝas sian membraron. Post enketo, la kunordiganto proponas liston al la estraro en la venontaj semajnoj.

Informoj de la Komisiito pde UEA pri Ameriko, Guy Matte

## De Argentino al Duolingo

S-ano Patricio Iglesias (TEJO-Komitatano) [patricio.iglesias@yahoo.com.ar](mailto:patricio.iglesias@yahoo.com.ar) serĉas kaj kolektas la subskribojn de UEA, ILEI, TEJO kaj de la landaj kaj fakaj asocioj, por prezenti peticion al la proprietuloj de Duolingo. Laŭ miaj informoj, la prezidantoj de UEA, ILEI, TEJO akceptis apogi ĝin. Al landaj asocioj, kaj la fakaj asocioj, kaj la kluboj, por peti similan apogon. Jen la deklaro/peticio:

<https://docs.google.com/document/d/1e8CKDR8Aa228bN58F5sSlc3AhtR5Diuv4PxR3vQuf1w/edit>

Ekzistas ankaŭ Telegramo-grupo, kiu nun laboras tiudirekten por Duolingemuloj:

<https://t.me/+QXLKVehBpgo3MjU0>

Prof Ruben Sanchez, Argentino

## Informado pri edukado en Eŭropo

La reto Eurydice estas informreto pri edukado en Eŭropo. Ĝi devus ebligi pli bonan komprenon de la edukaj sistemoj de la membroŝtatoj de la Eŭropa Unio kaj ĝiaj plej proksimaj najbaroj. Por havigi tiujn informojn al ĉiuj eŭropanoj, ni tradukigis la raporton al ĉiuj oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio. La tradukilo estis "[etranslation](#)". La titolo estas "Ŝlosilaj datumoj pri instruado de lingvoj en lernejo en Eŭropo" Jen la originalo en la angla, por tiuj, kiuj regas ĝin: [Eurydice2023B\\_tuto.pdf Originalo en la angla](#)

Pierre Dieumegard

## Duonpreza eblo en Greziljono

Se vi ŝatus praktiki Esperanton en julio aŭ aŭgusto sen elspezi tro da mono; nia franca kulturdomo proponas duon-tarifon por certaj kazoj aŭ reduktion kontraŭ helpo.

- 2023-julio-02/07: 4-a [Verda Semajno](#) kun INOE (naturistoj)
- 2023-julio-07/17: Sepa [Maratona Esperanto-kurso](#) kun *Duncan Charters* (UEA), *Radojica Petrović* (ILEI), *Szilva Szabolcs* (HU-PL), *Andrea Bertrand* (69), kun ILEI-ekzameno

- 2023-julio-07/17: 35-a [Internacia E-Konferenco](#) post OSIEK kun variaj **prelegoj**
- 2023-aŭg-28/sep-01: [Stud-sesio](#) por franclingvanoj kun *Christian Rivière*

### **BONVENON en via Esperanto-kastelo!**

Grésillon, F-49150 Baugé-en-Anjou, Francio;

Kontakto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

## **Juna Amiko – ĵus aperis la dua numero**

ILEI subtenadas sian valoran revuon kiu aperas kvarfoje en la jaro, en plena koloro.

## **Naturisme en la renoma kastelo – la nudaj faktoj**

Ĉu vi deziras sperti novan nivelon de libereco? Vivi en plena kongruo kun naturo kaj kun via korpo? Aŭ, pli simple, vi ŝatas bonan sunplenan etoson? Estas taŭga tempo por sperti naturismon! Por klarigi, naturismo estas maniero vivi harmonie kun naturo,



esprimita per socia nudeco, rilatanta kun memrespekto, toleremo de malsamaj opinioj kaj respekto de la medio.

Partoprenuen en la [kvara Verda Naturisma Semajno!](#) kiu okazos de la 3-a ĝis la 7-a de Julio 2023 en la Kastelo Greziljono, proksime de Angers, Francio. La semajno inkluzivos esperantajn kursojn je ĉiuj

niveletoj kaj diversajn aliajn aktivaĵojn. Ĉefe, estas oportuneco pasigi belegan semajnon kun esperantistaj naturistaj amikoj!

La Verda Naturisma Semajno estos kunorganizita de INOE - Internacia Naturista Organizo Esperantista (<https://www.esperanto-naturismo.org>) kaj la Kulturdomo de Esperanto. Vi povas aliĝi ekde nun ĉe: <https://gresillon.org/spip.php?rubrique21&lang=eo> kaj trovi pli da informoj en [http://gresillon.org/spip.php?page=article&id\\_article=196](http://gresillon.org/spip.php?page=article&id_article=196)

Thierry Spanjaard, Prezidanto INOE: Internacia Naturista Organizo Esperantista, [ts@who.net](mailto:ts@who.net)

===== vortoj: 1210 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

La arĥivo de EKO: : <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 30.).

**ALDONU VIN:** Skribu al [stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com). Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.,

